WIKIPEDIA

Belorusa lingvo

La **belorusa lingvo** aŭ **belarusa lingvo** (beloruse: *беларуская мова*) estas slava lingvo kaj la oficiala lingvo de Belorusio. Ĝi kun la rusa kaj ukraina lingvoj apartenas al Orienta slava lingvaro.

Laŭ informoj de censo farita en 1999 entute el 8.159 milionoj da belorusoj vivantaj en Belorusio nomis la belorusan lingvon kiel gepatra 85,6% (ĉirkaŭ 7 milionoj da homoj), kaj 41,3% nomis ĝin kiel lingvo uzata hejme. Aldone la belorusa estas gepatra por 67,1% el 395.7 mil popoloj vivantaj en Belorusio, 57,6% el ili hejme parolas beloruse.

Pro densaj kaj multjaraj kontaktoj kun la rusa lingvo en Belorusio kreiĝis lingva fenomeno nomata *трасянка* (trasjanka): mikso de la belorusa lingvo kun rusa leksiko, kaj foje kun sintakso. Tiu miksita formo estas simila al piĝino kaj kreola lingvo.

Belorusa lingvo	
беларуская мова	
Parolata en	Belorusio, Latvio, Litovio, Pollando, Rusio, Ukrainio
Parolantoj	7 milionoj
Skribo	belorusa alfabeto, latina alfabeto, araba alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa	
Slava	
Orienta slava	
Belorusa	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Belorusio, Pollando (kiel helplingvo en komunumoj Czyże, Orla, Narewka kaj Hajnówka)
Reguligita de	Instituto de Lingvo kaj Literaturo de Nacia Akademio de Sciencoj de Belorusio
Lingva statuso	2 vundebla
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	be
ISO 639-2	bel
ISO 639-3	bel
SIL	BEL
Glottolog	bela1254
Angla nomo	Belarusian
Franca nomo	biélorusse
Vikipedio	

Enhavo

Alfabeto

Ortografio

Eksteraj ligiloj

Vidu ankaŭ

Alfabeto

En la belorusa lingvo nun estas uzataj la cirila alfabeto kaj latina alfabeto. Antaŭe tataroj vivantaj tie ĉi skribis beloruse per la araba alfabeto.

En la tabelo ordigo estas laŭ la cirila alfabeto

La Patro Nia (Ойча наш) (taraŝkevica):

> *Ойча наш, які ёсьць на небе!*
> *Сьвяціся Імя Тваё.*
> *Прыйдзі Валадарства Тваё.*
> *Будзь воля Твая як на небе, так і на зямлі.*

> *Хлеб наш штодзённы дай нам сёньня.*
> *І адпусьці нам грахі нашы, як і мы адпускаем вінаватым нашым.*
> *І ня ўводзь нас у спакусу, але збаў нас ад злога.*
>
> *Амэн.*

Belorusa cirila alfabeto	Belorusa latina alfabeto	Esperanta prononco	Belorusa cirila alfabeto	Belorusa latina alfabeto	Esperanta prononco
А а	A a	a	П п	P p	p
Б б	B b	b	Р р	R r	r
В в	V v	v	С с	S s	s
Г г	H h	h	Т т	T t	t
Д д	D d	d	У у	U u	u
Е е	Je je	je	Ў ў	Ŭ ŭ	ŭ
Ё ё	Jo jo	jo	Ф ф	F f	f
Ж ж	Ž ž	ĵ	Х х	Ch ch	ĥ
З з	Z z	z	Ц ц	C c	c
І і	I i	i	Ч ч	Č č	ĉ
Й й	J j	j	Ш ш	Š š	ŝ
К к	K k	k	Ы ы	Y y	i
Л л	L l	l	ь		
М м	M m	m	Э э	E e	e
Н н	N n	n	Ю ю	Ju ju	ju
О о	O o	o	Я я	Ja ja	ja

Notoj.

- La belorusa cirila skribo ankaŭ uzas apostrofon ' aŭ ’, sed oni ne alkalkulas ĝin al la aboco kaj malagnoskas dum laŭalfabetigo.
- Foje oni uzas la literon *ґ* por la sono [g] (plejparte en pruntitaj vortoj). Antaŭe en la cirila skribo tiu sono estis reprezantata ankaŭ kiel *кг*. En la belorusa alfabeto ĝi sekvas post la litero Г.
- Ekzistas duliteraĵoj : дж / dž = [ĝ], дз / dz = [dz] (voĉa ekvivalento de *c* = ts), ĉiu el ili estas unu fonemo, kvankam skribata per du literoj.
- La latinskribaj supersignoj (se neeblas aŭ malfacilas uzi la ĝustajn simbolojn) anstataŭeblas per surogatoj. Ne ekzistas standarto por tio, jen estas unu el la sistemoj uzataj: ć = c', č = cz, l = l', ł = l, ń = n', ś = s', š = sz, ŭ = u / w, ź = z', ž = rz.

Kelkaj belorusaj literoj havas molan kaj malmolan variantojn. En la cirila skribo por moligaj vokaloj ekzistas apartaj literoj: *я, ё, ю, і, е* (koresponde la malmoligaj: *а, о, у, ы, э*). La konsonantoj estas molaj (palatalaj), kiam ili aperas antaŭ moliga vokalo aŭ speciala litero "mola signo": *ь*. Kiam konsonanto antaŭ moliga vokalo estas prononcata malmole, ili estas apartigataj per apostrofo. Ekzemploj:

> *пяць* (kvin), *пятніца* (vendredo), *п'яніца* (drinkemulo)
> *ялавічына* (bovaĵo), *лёс* (sorto), *лось* (alko)

En la latina skribo la malmoligaj vokaloj estas: *a, o, u, e*. La moligaj vokaloj estas signataj per *j* plus koresponda mola se la vokalo aperas komence de vorto aŭ post alia vokalo, kaj estas signataj per *i* plus koresponda moliga vokalo, se la vokalo aperas post konsonanto. Moleblaj konsonantoj antaŭ alia konsonanto aŭ finvorte havas apartan literon (malmola/mola): c/ć, ł/l, n/ń, s/ś, z/ź. La apostrofo kaj "malmola signo" ne uziĝas en la latinskribo. La samaj ekzemploj latinskribe:

> *piać*, *piatnica*, *pjanica*
> *jałavičyna*, *los*, *łoś*

Ortografio

En 1933 estis akceptita lingva reformo, kiu forte ŝanĝis la ortografion de la belorusa lingvo direkte al plia pecizeco. Tiu reformita varianto estas oficiale uzata ĝis nun, kaj uzantoj de la malnova varianto de ortografio nomigas ĝin *наркамаўка* (narkamaŭka). Oficiale ĝi simple nomiĝas *(nuntempa) ortografio* . La antaŭreforma varianto nomiĝas *тарашкевіца* (taraŝkevica). Ĝi estis daŭre uzata ekster Soveta Belorusio kaj nun estas vanaj atempoj renovigi ĝian pli aktivan uzadon en interreto kaj tiel nomataj sendependaj periodaĵoj. Aliaj nomoj: "(nov)klasika", "tradicia". Respektive ekzistas du vikipedioj en la du ortografioj: la oficiala be.wikipedia.org (https://be.wikipedia.org) kaj neoficiala be-x-old.wikipedia.org (https://be-x-old.wikipedia.org) (estis kreita speciala ISO-kodo "be-x-old").

Eksteraj ligiloj

- Esperanta-belorusa kaj belorusa-esperanta vortaroj (http://esperanto.pisem.net/vortaroj.html)
- Esperanta-belorusa vortaro fare de Zmicier Lapcionak (http://www.webcitation.org/query?id=1256562408118349&url=www.geocities.com/dipela/Paulukavec/vortaro/index.html)
- eVortaro — programo kun kelkaj esperantaj vortaroj, inluzive de esperanta-belorusa (http://evortaro.ru/index_e.html)
- Prilingvaj artikoloj, diskutoj, programoj (http://pravapis.org/) (angle kaj beloruse)
- Kalita I. V. Современная Беларусь: языки и национальная идентичность. Ústí nad Labem, ISBN 978-80-7414-324-3, 2010, 300 s. s. 112-190. (http://kamunikat.org/Kalita_Ina.html)

English-Belarusian dictionaries, in Lacinka (http://www.belarusguide.com/dictionaries/engblr/index.html)
Metrica of GDL (http://www.belarusguide.com/culture1/texts/Metrika.html)
Statutes of GDL (http://www.belarusguide.com/culture1/texts/Statut.html)
Padlaska cyberwioska (http://cybervioska.w.interia.pl) (latina skribo)

Slava lingvaro

Okcidentslavaj	ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo)
Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo •

Orientslavaj	serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ... belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†

Vidu ankaŭ

- Lingvistiko
- Listo de lingvoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Belorusa_lingvo&oldid=6204310"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:11, 12 sep. 2017.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.